



LA DEK-SEPA



Organe Mensuel Espérantiste.

RÉDACTION ET ADMINISTRATION : H. de COPPET
179, Boulevard Pereire, Paris.

ABONNEMENT : *France*, 1 franc, — *Etranger*, 1 fr. 50 par an.
Ne paraît pas en Août et Septembre.

TARIF DES ANNONCES :

Une année : 1/4 page, 40 fr. ; 1/2 page, 70 fr. ; une page, 120 fr.

GRUPO FUNDAMENTISTA « LA DEK-SEPA »

Groupe Espérantiste du XVII^e Arrondissement de Paris.

Réunions amicales tous les Mercredis soirs, à 9 heures,
Café de la Gare, 6, Place Pereire, Paris. Entrée particulière.
Téléphone 530-46. Métro : Pereire.

Notre Dîner mensuel.

A l'occasion du premier anniversaire de la fondation de la « Grupo Fundamentista la Dek-Sepa », notre prochain Dîner mensuel du Mercredi 2 Juillet 1913 sera suivi de la réception par les membres de notre Groupe, des membres des Groupes Parisiens indépendants.

Le prix du dîner est fixé, comme d'habitude, à 3 fr. 25 (boisson et pourboire compris). Café de la Gare, 6, place Pereire, Paris ; à 20 heures.

Avis

Pendant la période des vacances (Juillet, Août, Septembre) nos réunions hebdomadaires ne seront pas suspendues. Chaque mercredi une lecture sera faite par l'un des Espérantistes présents : cette lecture sera choisie dans un ouvrage classique.



MM. Robert Germain et Maurice Michon, membres du « Grupo Fundamentista la Dek-Sepa », viennent de passer avec succès les épreuves de l'« Atesto pri Kapableco ». Nous les félicitons très sincèrement.



Le président de la Société Française pour la Propagation de l'Espéranto (S. F. P. E.) a demandé à tous les groupes français leur avis au sujet de la cotisation que les groupements désirent verser à la société nationale. (Décision du Congrès de Toulouse.)

Dans sa séance du 7 Mai 1913, le Comité du Groupe Espérantiste « La Dek-Sepa » a décidé de répondre par la solution d'une cotisation de 0 fr. 25 par membre et sans partie fixe.

Le secrétaire,

ROBERT BOLLACK.

ERRATUM. — En la junia numero de « La Dek-Sepa », pago 11-a, linio 22-a, anstataŭ: « Dek-Sep kun reĝo sed *kun* karto alikolora », legu: « Dek-Sep kun reĝo sed *sen* karto alikolora ».

ĈIUJ AL BERN!

La Naŭa Kongreso de Esperanto okazos en Bern, de la 24-a ĝis la 31-a de Aŭgusto 1913.

Ĉies devo estas pruvi al niaj kontraŭuloj la fortecon kaj la viglecon de nia movado, la belsonecon de nia lingvo. Samtempe la kongresanaro ne bedaŭros sian vojaĝon, ĉu pro la

festoj, kiuj okazos en Bern, ĉu pro la ekskursoj, kiujn ili certe plenumos en la mondfama Svislando.

Ni iru multenombraj en Bern, ĉefurbo de libera lando!
Vivu la Naŭa! Vivu la Fundamento de Esperanto!

« LA DEK-SEPA ».

N.-B. — La Kongresa Sekretariejo estas: Hotel Bristol, Schauplatzgasse, Bern. La kongresa karto kostas 15 frankojn (6 spesmiloj). La mono estu sendata al Kantonbank, Bern, kaj korespondataĵoj al la Organiza Komitato de la Naŭa Kongreso de Esperanto en Bern.



Unua datreveno

La 3-a de Julio estas la unua datreveno de la fondiĝo de nia Fundamenta Grupo « La Dek-Sepa ». Dum tiu pasinta jaro ĉiuj Dek-Sepanoj laboris por la disvastiĝo de nia kara Esperanta lingvo.

Sentime kaj kuraĝe ni daŭrigu nian laboron, por plifortigi nian Grupon kaj triumfigi laŭfundamentan Esperanton!

Ni restu fidelaj por venki!

LA KOMITATO
DE LA GRUPO FUNDAMENTISTA
« LA DEK-SEPA ».



PRI FORMIKARO

Ni ĵus ricevis la sekvantan leteron de nia eminenta kungrupano :

Paris, la 11-an de Junio 1913.

Kara amiko,

Mi tre dezirus ĉeesti vian hodiaŭan kunvenon, kaj prezenti mem mian proponon al viaj kungrupanoj; sed, ĉar mi ne estas libera hodiaŭ vespere, mi vin petas, ke vi bonvolu komuniki al ili ĉi tiun leteron.

Vi eble scias, ke en « Lingvo Internacia », mi iniciatis propagandan movadon, kiun mi nomis « Esperantista Formikaro ». Ĝi ne estas verdire societo, sed nur ariĝo de bonvoluloj, kiuj promese sin ligas *varbi ĉiujare kaj instrui mem*, po *unu* el siaj parencoj, amikoj aŭ konatoj. Tio ne estas ekstergrupa, sed male porgrupa agado. Poŝtkartoj alvenis al mi el diversaj landoj, varme aprobantaj la ideon, kiun oni generale juĝas fruktodona. Tial, mi esperas, ke en tiel fervora grupo, kiel estas la Dek-Sepa, ĝi renkontos favoran akcepton.

Tiuj el viaj gekunuloj, kiuj konsentos preni sur sin la instruadon de unu varbito, dum la periodo kiu etendiĝos de l' Berna ĝis la Pariza Kongreso, bezonas nur sendi al mi poŝtkarton kun sia nomo, por ke mi povu, pli malfrue, kalkuli la rezultatojn.

Kun antaŭa danko, akceptu, mi petas, kara amiko, mian plej koran manpremon.

ERA.

N. d. l. R. — Ni tiom pli volonte publikigas tiun ĉi maloficialan leteron, ke ĝi resumas la ideon, kiun ni ĉiam propagandis dum niaj grupaj kunvenoj.

La Dek-Sepanoj, kiuj deziras helpi al la sukcesigo de tiu bonega ideo, bonvolu sendi al *S-ro H. de Coppet, 179, boulevard Pereire, Paris*, ĉiujn poŝtkartojn, kiujn li kolektos kaj transmetos en unu fojo al S-ro Era, kiu tiamaniere povos vidi la rezultatojn de la « Formikaro ».

KIU ?

Komedieto ludita ĉe Esperanta propaganda festo de la « Dek-Sepa »,
la 15-an de Aprilo 1912.

Personoj : BADINOIS S-ro V. N. Devjatnin
BEZUCHET. S-ro Henri de Coppet

La scenejo prezentas salonon de BADINOIS kaj BEZUCHET.

SCENO I.

(Daŭrigo kaj fino.)

BEZUCHET. — Estas pli forte ol mia volo, kiam mi pensas, ke ŝi estas tie kun li !...

BADINOIS. — Kaj ci nenion kontraŭpovas ! Akceptu la situacion, diablo ! estu pli kuraĝa !

BEZUCHET (*prenante la leteron anoniman kaj montrante ĝin*). — Mi tre dezirus konstati, kian mienon ci montrus mialoke.... Se ci kredas, ke la afero estas ĝojiga, eksciĝi, ke via edzino.... (*Traleĝante rapide la leteron; kun ekkrio*) Ha !!

BADINOIS. — Kio estas ?

BEZUCHET. — Ci malbone legis ! Ne estas skribite « *via* edzino ».

BADINOIS. — Kiel ! *Via* ne estas skribite ?

BEZUCHET. — Neniam en la vivo ! Malbone skribite estas... sed oni povas legi « *viaj* edzinoj ».

BADINOIS (*eltirante de liaj manoj la leteron*). — « *Viaj* edzinoj ! » Ne eble estas ! Ci ne scias bone legi. (*Montrante la leteron al li*) Rigardu, « edzino » estas uzata ununombre !

BEZUCHET. — Jes, sed estas amiko, kiu ne tre bone konas la gramatikon ! sed estas skribite « *viaj* », mia kaj cia !

BADINOIS. — Laŭra, esti malfidela kun la Doktoro ?...

BEZUCHET. — Kompreneble, kiel mia edzino ! Ili ĉiam ambaŭ havas la samajn gustojn !...

BADINOIS. — Vere, lasu min ridi ! Unue, ŝi juris al mi, ke se iam ŝi malfidelus min, estus kun parfumisto !...

BEZUCHET. — Tre certe, ŝi opinion ŝanĝis ! !...

BADINOIS. — Kaj mi ripetas al ci, ke neeble estas. Ke cia edzino estu malfidela, la afero estas evidenta, sed, ke mia same agas, neniam mi kredos ĝin.

BEZUCHET. — Nu, ni prenu konsilon ĉe la grafologio.

BADINOIS. — Ho! la grafologio! Ne devige estas, ke oni kredu ĉion, kion ĝi montras.

BEZUCHET. — Antaŭ momento, ci mem pretendis, ke ĝi neniam eraris!

BADINOIS. — Ĝi malofte eraras... sed tamen tio kelkfoje okazas! Krom tio, mi ne timas cian grafologion. Montru ĝin!...

BEZUCHET (*kaptante notlibron sur la tablo*). — Jen precize la aĉetlibro de cia edzino ĉe la buĉisto!... (*Turnante la foliojn*) «... Du funtojn da bifsteko». Rigardu, kiel la literoj «o» estas skribitaj!

BADINOIS. — Kion ili havas?

BEZUCHET. — Ci bone vidas, ke ili ne estas fermataj.

BADINOIS. — Vere estas.

BEZUCHET. — Kaj la literoj «to»... Ha!... La literoj «to» ne estas transstrekitaj.

BADINOIS (*malkvieta*). — Ĝi ne transstrekas la literojn «to»!!

BEZUCHET. — Tute same, kiel Adelo!

BADINOIS (*aparte*). — Vere estas. Ha ĉu vere mia edzino....

BEZUCHET. — Ci bone vidas.... Ci ĝin ankaŭ estas! (*Premante al li la manojn*) Ha! tio treege ĝojigas min.

BADINOIS. — Kiel! Ci ĝojas pri tio?

LA VERA TIZANO DE L' PASTRO DE DEUIL

preparita de S-ro Duvergier, en Argenteuil, mirinde efikas kontraŭ ĉiuj doloroj, reŭmatismoj, neŭralgioj, kontraŭ la aĝatakoj, la mallakso kaj la grasegeco.

La paketo : 1 Fr. 50 (Sm. 0,60)

==== Tuj ricevebla kontraŭ poŝtmandato. ====

Specimeno kaj broŝuro senditaj senpage tuj post demando al
S-ro DUVERGIER, 9, Rue Laffitte, Paris.

BEZUCHET. — Certe ! Kio turmentis min, estis pensi, ke mia edzino malfidelis min, sed de la momento, kiam por ni ambaŭ la afero okazas....

BADINOIS (*furioza*). — Tio konsolas cin ?...

BEZUCHET. — Ŝajnas al mi, ke la afero malpli grav-
iĝas !... (*Jetante sin en siajn brakojn*) Ha ! karulo !

BADINOIS. — Lasu min trankvila !...

BEZUCHET. — Mi ne povas sufiĉe bone esprimi mian
ĝojon !

BADINOIS. — Cian ĝojon ! Do, ci estas kontenta eksci-
iĝi, ke Lia Doktora Moŝto kolombumiĝas nun kun niaj
edzinoj ?

BEZUCHET. — Kiel kolombumiĝas ?

BADINOIS. — Estu certa, ke li bone sin okupas. Li ĉiu-
maniere helpas ilian kuracadon.

BEZUCHET. — Prava ci estas ! Ha ! Kia fripono !

BADINOIS. — Li bezonas du virinojn por pasigi la tempon !

BEZUCHET. — Estas tro.

BADINOIS. — Kial li ne kontentiĝis kun cia ?

BEZUCHET. — Nun, mi komprenas, kial li promesis al
ili baldaŭan idaron. De la momento, kiam li mem parto-
prenas en la rezultato.

BADINOIS. — Kaj estas tiel, ke li rapidigas ilian kurac-
adon !

BEZUCHET (*malespere*). — Plendinda amiko !

BADINOIS (*ekfalante en seĝegon*). — Nenia dubo. Ambau
ni ĝin estas !...

KONTRAŭ
M A R -
MAL-
SANO

DELPHININE

De l' DOKTORO FLASSCHEN.

KONTRAŭ
FERVOJ-
MAL-
SANETO

Tiu ĉi farmaciaĵo, absolute sendanĝera, ricevis la **Grandan
Premion** ĉe la Internacia Ekspozicio de Higieno, okazinta en
Parizo en 1908.

Prezo de la boteleto : 10 fr. (4 S).

Aĉetebla ĉe S-ro WEITZ, 8, Rue de Duras, Paris
kaj ĉe ĉiuj farmaciejoj.

BEZUCHET. — Ci vidas, ke ci ne pli bone ol mi akceptas cian situacion.

BADINOIS. — Prava ci estas ! Ni ne malkuraĝigu. Ni kontraŭstaru !...

BEZUCHET. — Jes, ni montru, ke ni apartenas al la forta sekso !

BADINOIS. — Ĉion konsiderante, estas malfeliĉo, kiu ĉiutage okazas.

BEZUCHET. — Ni ne estas la unuaj.

BADINOIS. — Nek la lastaj ! Nur io ĉagrenigas min : estas plenkoni mian malfeliĉon !

BEZUCHET. — Fakto estas, ke kiam oni ne scias, estas kvazaŭ nenio okazis !...

BADINOIS (*montrante la anoniman leteron*). — Kia monstrulo estas tiu, kiu ĝin skribis !...

BEZUCHET. — Certe, ci jam spertis, ke kiam oni havas malbonan informon por sciigi, la amikoj estas la unuaj pretaj por helpi al vi !

BADINOIS (*kun la letero en la mano*). — Li eĉ ne kuraĝis subskribi ĝin !

BEZUCHET. — Sed li kuraĝis ĝin sendi al ni !

BADINOIS (*kolektante la koverton, kiun li antaŭe ĵetis teren*). — Jen la koverto kun ambaŭ nomoj ! Se ankoraŭ nur cia nomo estus skribita ! sed ne, ambaŭ ili estas !... Ne mankas eĉ unu litero. (*Legante*) « Al Lia Doktora Moŝto S-ro Malissard... ». Kio ĝi estas ?

BEZUCHET (*stonigita*). — Malissard ?

BADINOIS. — Estas neeble ! Mi fuŝlegis ! Ne ! (*Legante*)

OUVRAGES de M. Henri de Coppet.

En vente à la Rédaction de « La Dek-Sepa ».

-
- L'Esperanto appris sans maître en 45 leçons fr. 1,50
Recueil de phrases, édition Française-Esperanto, plus de
2800 phrases de la vie usuelle fr. 1,80
L'Espero, hymne espérantiste de D-ro L. L. Zamenhof,
édition pour tenor ou soprano fr. 1,50

« S-ro Malissard, 6, Placo Pereire »... Estas tutlitere skribite. (*Tute kontentoge al Bezuchet*) Ha! karulo mia!!

BEZUCHET. — Nu klarigu al mi, kion signifas tiu letero?

BADINOIS. — Ĝi estas al la Doktoro adresita.

BEZUCHET. — Kiel? Ĝi tute ne koncernis nin?

BADINOIS. — Tute ne, la pordistino eraris!

BEZUCHET (*sufokante*). — Tiamaniere, ambaŭ edzinoj ne malfidelis nin!

BADINOIS. — Tiu edzino estas lia.... Ha! Ha! Ha!

BEZUCHET. — Ha! Ha! Plendinda Doktora Moŝto! Kaj ni, kiuj lin kulpigis!

BADINOIS. — Kaj estas li, kiu....

BEZUCHET. — Vere, mi tute ne komprenas, kiel ni ne tuj divenis ĝin... sufiĉas rigardi lin por....

BADINOIS. — Fakto estas, ke lia aspekto divenigas tion!

BEZUCHET. — Kiam mi pensas, ke ni, momenton, kredis, ke ni estis....

BADINOIS. — Pli malsprita ol ĉi, mi nenium vidis, por kredi tian absurdaĵon!

BEZUCHET. — Atentu ciajn parolojn!

BADINOIS. — Ni tuj aldirektu tiun leteron al nia kara Doktora Moŝto!

BEZUCHET. — Jes, jes, ni alrapidu al poŝto! Oni devas neniam prokrastigi bonajn sciĝojn!...

BADINOIS (*revenante*). — Mi algluigos tri postmarkojn... tiamaniere, ĝi tiom pli rapide alvenos.

BEZUCHET (*alirante al li*). — Jen cia ĉapelo! Ha! karulo mia!!

BADINOIS. — Karega Bezuchet! Nu, la honoro de l'parfumistaro restas nedifektita.

BEZUCHET. — Sed en la doktoraro unu pli surportas la kornojn!!

(*Ili eliras ridegantaj, brako sub brako.*)

KURTENO

El la franca lingvo tradukis H. DE COPPET.



RUZA JUĜISTO

Petro kaj Paŭlo aperas antaŭ la juĝisto. Tiu ĉi alvokas Petron, ke li eldiru sian plendon kontraŭ Paŭlo.

PETRO. — Mi estis en amika interrilato kun Paŭlo. Antaŭ unu jaro mi devis forvojaĝi el tiu ĉi urbo. Tiam, antaŭ ol foriri, mi transdonis al li mian ĝistiaman ŝparaĵon, dudek ormonerojn, por ke li gardu ĝin dum mia foresto. Nun mi revenis el mia vojaĝo, kaj mi petis de li mian monon. Sed li rifuzas....

PAŬLO. — Sinjoro juĝisto, tiu ĉi homo ne diras veron. Li mensogas. Li estas maljustulo, senrajtulo, ĉarlatano, trompisto. Li neniam donis al mi monon.

LA JUĜISTO (al Petro). — Ĉu vi havas atestantojn ?

PETRO. — Ne, sinjoro juĝisto. Ni estis bonaj amikoj kaj mi plene fidis en li. Neniu atestanto ĉeestis tie, kiam mi transdonis al li mian monon, sub unu kverko...

PAŬLO. — Malveraĵo ! Mi nenion scias pri lia vojaĝo, nek pri lia mono, nek pri tiu kverko.

LA JUĜISTO (al Petro). — Vi asertas, ke vi transdonis al Paŭlo la monon sub unu kverko. Paŭlo neas tion. Sed se via afero estas justa, tiu kverko faros ateston por vi. Alportu do tien ĉi unu folion de tiu kverko. Iru tuj. (Al Paŭlo) Kaj vi, sidiĝu kaj atendu tie ĉi la revenon de Petro kun la kverkfolio.

PAŬLO. — Ĉu mi atendu lian revenon tie ĉi ? Ho, mi preferus reiri hejmen kaj reveni post kelkaj horoj. Ĉar sciu, sinjoro juĝisto, ke tiu kverko estas pli ol unu mejlon malproksime de la urbo, kaj Petro certe ne revenos antaŭ la vespero.

LA JUĜISTO. — Ha ! vi do konas *tiun* kverkon.... Tre bone ; jen ĝi jam faris ateston....

Kaj la juĝisto kondamnis Paŭlon kaj devigis lin repagi la dudek ormonerojn al Petro.

El hungara, laŭmemore esperantigis

PAUL DE LENGYEL.

(El « Juna Esperantisto ».)



HUMORAĴOJ

Sistemo. — Kara sinjoro, donu unu kopekon al mizerulo. Mi ja estas eks-literaturisto !... — Efektive ? Kion vi do verkis ? — Grandan libron titolitan : Dekdu rimedoj por riĉiĝo ! — Kaj tamen vi petas almozon ? — Jen ĝuste estas unu el la rimedoj, kara sinjoro.



Sprita respondo. — *Li* : Mi tre miras, ke vi surmetas hararon de *alia homo* ? — *Ŝi* : Mi ankaŭ miras, ke vi surmetas vian kostumon, fabrikitan el lano de *alia safo* !



Inter ĉasistoj. — Ŝajnas al mi, ke vi intence maltrafas la bestojn. — Estas vere : cetere mi devas diri al vi, ke mi estas vegetarano.



Epitafio. — En Ĉikago unu vidvino mendis jenan epitafon por la tombŝtono de sia mortinta edzo : « *Ripozu pace ĝis kiam mi venos* ».



Mobilizi. — Paĉjo, kio estas « mobilizi » ? — Se multaj soldatoj kunvenas. — Nu, paĉjo, sekve nia kuiristino nun mobilizas : estas tri soldatoj en la kuirejo.



En hotelo. — He, lakeo, rigardu, la lito estas tute kovrita per polvo. — *Lakeo* : Ne, sinjoro, ĝi ne estas polvo, ĝi estas cimpulvoro.



Prefero. — *Patro* (al sia fileto) : Nu, ĉu vi dezirus frateton aŭ fratineton ? — *Fileto* : Se estas tute egale al patrino, — mi preferus ĉevalidon.



Justeco de la naturo. — La naturo estas justa, — klarigas instruisto en lernejo. — Kiu ricevis unupartite tro malmulte, estas provizita aliparte des pli bone. Ekzemple la blindulo. Li ne povas vidi, sed des pli delikataj estas lia aŭd- kaj palpsento. Kiu scias alian ekzemplon ? — Lamulo, — diras lernanto, — jen li havas unu kruron mallongan, sed ju pli mallonga estas unu lia kruro, des pli longa estas la alia.



Vera
 Ferhava Salo
 alsimiligobla
 ELTROVITA DE
 M. Maurice ROBIN
 en 1881.

LA
Fer Robin

mirinde efikas
 KONTRAŬ
 SENSANGECO,
 PALKOLOREGO,
 SANGELFLUOJ
 ĈIUSPECAJ
 Akcelas la nutradon kaj
 neniam mallaksigas.

Tiun ĉi kuracilon, absolute sengusta, oni uzas laŭ la dozo de 10 ĝis 30 gutoj ce ĉiu mango, ĉu en iom da akvo aŭ vino. La enhavo de la boteleto reprezentas la daŭron de tri semajnoj ĝis unu monato da kuracado.

Por eviti la falsajojn
POSTULU la **ROBIN**
 VENDEDJO POGRADE:
13, Rue de Poissy, PARIS